

## La Rakonto de Irma el Latvujo

(Parolita okaze de Carelinks Konferenco en Anglujo, 2012)

Mi volas danki al vi pro la bona laboro, kiun vi farigis en Latvujo kaj en mia propra vivo. Mi ekkomprenas, ke vi volas, ke mi rakontu al vi ion pri mi kaj mia sperto de graco.

Mi estas latvo, sed mi naskiĝis en rusio. Mi estas filino de rusa armea oficiro, kiu estis subpremita dum la jaroj de Stalin (multaj latvoj - kaj ne nur latvoj - simile suferis). Oni reinstalis lin kiam li volontis iri por batali kontraŭ faŝismo. Post la milito ni venis en Latvujon kaj mi ĉeestis latvan lernejon, sed poste mi iris studi la anglan lingvon en la Moskva Instituto de Fremdaj Lingvoj. Mia edzo estis rusa-parolanto, mia filino ediniĝis al ruso kaj mi nun loĝas kun ili. Mi do, estas dulingva, rusa kaj latva, sed en la soveta tempo la plej multo de latvoj estis dulingvaj. Mi estas kvazaŭ inter du mondoj, rusa kaj latva.

Kiel ĉiuj en la Sovetunio mi estis edukita laŭ la dogmoj de marksismo, ateismo kaj materialismo. Mi ne estis religia persono. Mi estis akceptinta komunismon kiel sistemo en kiu ne estas privata havaĵo; aĵoj estas komunaj kaj haveblaj al ĉiuj laŭ bezono. Oni diris, kaj estis vaste akceptita, ke la morala kodo de la komunista partio baziĝis sur la Biblio, sed mi konfesas, ke mi ne profunde pensis pri tio. Mi okupiĝis pri la vivo, edukante mian filinon, laborante en la universitato en Riga kie mi instruis la anglan. Mi rimarkis, ke la aŭtoritatoj markis iujn studentojn kiel 'Kredantojn', la subteksto de kiu estis 'oni pritraktu ilin pli severe', kaj mi ne povis tion kompreni, ankoraŭ kredante, ke ni havas liberecon de konscienco laŭ la sovetunia konstitucio. Mi demandis min pri tio sed mi ne opinias, ke estis ia diskriminado en nia fakultato. Denove, mi ne tiel profunde pensis.

Kiel vi sendube scias, en 1991 Latvio sin forrompis de la Sovetunio, kaj soveta potenco en Latvio ĉesis. Estis libereco de religio kaj libereco vojaĝi, kaj mi aĉetis mian unuan anglalingvan Biblion dum ekskurso en Francujo. Biblioj ne estis facile haveblaj in la Sovetunio sed mi ĉiam volis unu posedi. Tiam mi vidis reklamon en rusa ĵurnalo por la libro 'Bibliaj Bazaĵoj', kaj mi skribis al Duncan por peti ekzempleron, kiun mi fakte ricevis. Mi studis la lecionojn. Ĉio havis sencon kaj mi supozas, ke mi komencis kunigi ĉion kaj ekvidi, ke jes, Dio ekzistas kaj, ke lia ekzisto respondis al demandoj, kiujn mi jam havis senkonscie. Duncan invitis min ĉeesti seminarion pri la Biblio. Je tiu tempo mi havis la impreson, ke eklezio estis por maljunulinoj, kaj en tiu tempo mi ne sentis, ke tio estas por mi. Laŭ Somerset Maugham 'La tragedio de maljuneco estas, ke oni ankoraŭ sin sentas juna!'. Tamen mi ja ĉeestis kaj miris, ke tie estis gejunuloj kaj tre vigla kaj entusiasma spirito por la diaĵoj. Mi plenumis ĉiujn bibliajn lecionojn de la kurso kaj

Duncan sugestis, ke mi baptiĝu. Mi sciis, ke mi devis decidi eniri interrilaton kun Dio kaj Jesuo kaj aliaj kredantoj, tial mi baptiĝis, kaj neniam poste malantaŭen rigardis.

Vi petis min paroli pri graco, la nemerita bonkoreco de Dio doni al ni la savon se ni kredas, sendepende de niaj agoj; aŭ, laŭ la vortaro: 'senmerita dia helpo al la homoj por ties renaskiĝo kaj sanktigo.' En la rusaj kaj latviaj vortaroj de la soveta tempo tiu signifo de la vorto ne troviĝas, ĉar oni silentigis la ekziston de Dio - 'kial paroli pri io, kiu ne ekzistas?' La ideo ricevi ion senpage estas fremda por la plej multo da homoj. Kompreneble homoj povas esti bonkoraj, afablaj, sed gracon kiel komprenatan en la Biblio oni ne konas. Mi supozas, ke tio estas vera por la plej multo da socioj en la mondo. Sed mi opinias, ke tia kompreno de graco estis precipe fremda por la sovetuloj. La etoso estis, ke per forta laboro okazos progreso kaj antaŭenigo. Oni suspektis ion senpagan; la ofta onidiro estas 'Senpaga estas fromaĝo en la muskaptilo.' La moto je ĉiu stratangulo estis 'De ĉiu laŭ ties kapablo, al ĉiu laŭ ties laboro.' Bonkoreco kaj donacemo estas unu afero sed la graco de Dio estas tute alia, precipe pro tio, ke ni estas pekantoj. Mi kiel la plej multo, havas konscion, kaj ekzistas akceptebla kaj neakceptebla konduto en la socio, sed la ideo, ke oni povas peki kontraŭ persona Dio kaj, ke li povas pardoni vin kaj doni al vi eternan vivon - nu, tiaj ideoj estis tute fremdaj al tiuj, kiuj vivis sub ateismo kaj materialisma pensmaniero.

Mi supozas, ke unu ŝlosilo por ekkompreni gracon estas pardono. La soveta reĝimo igis la homojn tre memfokusitaj, ne esprimante siajn pensojn, singardaj kaj nepardonemaj. Mi tradukis la pensojn de Frato Steve Gretton pri pardono, kaj mi trovis ilin tre helpemaj por ekkompreni gracon. Tiuj paroloj estis por mi unu paŝo supren. Ankaŭ helpa por mi estis la tradukado de artikolo de Duncan pri la 'bona Samaritano'. Ni estas tiu vundita viro; ni devas akcepti la helpon de Jesuo, kiu estas la bona Samaritano. Mi plue trovis helpa la ideon, ke ni mem devas akcepti plenan respondecon pro niaj pekoj. Sen tio eble oni ne povas kompreni gracon. Mi pensas, ke la plej multo da homoj, inkluzivante tiuj, kiuj estis sovetoj, taksas sin sufiĉe bonajn; la kulpo ĉiam estas je la aliuloj. Estis tre malfacile agnoski, ke Dio povus enveni ies vivon kaj pardoni (kiel ŝajne li savis min kiam mi naĝadis kiel junulino). Ankoraŭ estas malfacile por multaj ekssovetoj; verŝajne estas malfacile por ĉiuj homoj kie ajn en la mondo ili estas.

Estas malfacile pardoni homojn se ili ne pentas aŭ pardonpetas. Ellasi la pekojn de aliuloj kiel Dio jam ellasis la niajn estas tre malfacile. Pardoni signifas ellasi fine, venki ian ajn vengemon. Se tio okazus jam ne estus streĉitado inter la rusaj kaj latvaj popoloj; ne estus ĉiama aludo al la pasinteco. Sed por la sekularaj, agnostikaj homoj en latvia socio eble ne estas ia instigado fari tion ĉar neniu havas la sperton de ricevante

pardonon de Dio pro siaj pekoj. Eĉ se ili sin rigardas kiel ‘religiaj’, ĉeestante luteran aŭ ortodoksan preĝejon, estas malmulte da konstato, ke ili estas pardonita de Dio, tial ne reala sperto de pardono. Estas do malfacile por ili pardoni aliulojn, kaj malfacile kompreni gracon.

La tutan tempon ni predikadas gracon. Mi jam aŭskultis tre multajn parolojn de Duncan, multe pli ol mi povas memori, kaj kutime li aludas al graco. Sed mi ne certas, ke la homoj tion komprenas. Ŝajnas al mi, ke oni komprenas gracon nur per persona sperto. Estas unu afero legi pri ĝi aŭ aŭdi pri ĝi, sed ni devas vidi ĝin por vere kompreni ĝin kaj estu instigata mem tiel vivi.

Se temas pri mia propra sperto de graco, mi kredas, ke ĉiuj homoj naskiĝas havante malprecizan senton, ke estas potenco super nin, ĉu oni naskiĝas en religian aŭ ateistan familion. Kaj dum via vivo Dio frapas vian pardonon, la pardonon de via koro; se vi ne aŭskultas li estas sufiĉe graca frapadi denove kaj denove. Mi ĉiam multe legadis; kaj rusa kaj latva literaturo multe mencias Dion kaj citas la Bibliion. Tio voligis min legi la Bibliion, sed en la soveta tempo Biblioj ne estis facile haveblaj, do tiu nur restis. Nur post mia bapto kaj tiuj aludoj al graco en la paroloj de Duncan mi ekkonis, ke mia junula sperto fakte estis Dio frapante, provante alproksimiĝi al mi:

Mi naĝadis en la maro. Mi ekstaris, rigardis supren al la pinoj sur la marbordo, la ĉielo, la sablo ... la koloroj heliĝis multfoje ... kaj mi staris, mirante je la vidaĵo. Post iom da tempo ĉio renormaliĝis. La unua persono al kiu mi parolis pri tio estis Duncan. Nur post tiom da jaroj mi konstatis tion, kio ĝi estis.

Nia eklezio en Riga multe kreskis pro graco, kiu kondukas min demandi ĉu eblas misuzi aŭ eĉ fiuzi gracon. Ekzemple, kiam ni komencis provizi manĝaĵon dum la kunvenoj por la stratuloj kaj tiuj loĝante en la nokto-loĝejoj, pli multaj ĉeestis. Estis graco provizi manĝaĵon por tiuj homoj. La evidenta demando: ‘multaj el tiaj homoj estas en tia situacio pro ties propra kulpo, ties propraj decidoj’. Nia ĉiama timo estis, ‘ĉu ili ne nur uzos nin?’ Mi supozas, ke tiu ja estas risko, do mi sugestis, ke vivi grace enhavas riskon. Pli persone, ni povas pardoni iun sed ili povus misuzi tion, kaj fine misuzi nin. Sed ĉu tio signifas, ke ni ne montru gracon? En mia vivo mi vidas kiel Dio montradis al mi gracon en mia junula sperto kaj poste; fakte mi supozas de mia naskiĝo. Eble eĉ antaŭ tiam; antaŭ la kreitado de la mondo Dio konis nin per graco. Eblas, ke mi ne respondus al tiu graco. Povus okazi, ke mi estus atinginta la finon de mia vivo sen respondinte al la puŝetoj kaj instigoj, kiujn Dio donis al mi. Sed miakaze mi almenaŭ provis respondi. Sed ne estus malĝusta por Dio montri al mi tiun gracon, provi helpi min.

Tial eble nia montrado de graco en Riga, kaj ĉie, estas ia provado, same kiel Dio provas por milionoj da homoj en ĉi tiu momento.

Pli simple, estas ankaŭ vere, ke troviĝas multaj senhavuloj en Latvio nuntempe, kaj ni devas klopodi ilin helpi. Mono ekzistas, sed malmultaj havas, kaj troviĝas homoj, precipe la maljunuloj sen subtenantaj familioj, pri kiuj la stato ne bone zorgas. Troviĝas ankaŭ tiuj, sen la ĝustaj dokumentoj; ekzistas diskriminacio; estas multaj faktoroj kaj kialoj pro kiuj la stato ne prizorgas homojn. Por multaj, pensioj kaj infana subteno estas tre malgrandaj. Infana subteno estas nur proksimume 8 latoj monate, kaj iuj el tiuj, kiuj vivas en la noktaj loĝejoj ricevas nur 7 latoj monate. Neniu povas vivi per tio. Do kiel mi diris simple, graco signifas esti gracema al aliuloj sen eĉ atendente respondon.

Mi scias, ke centoj da homoj, laŭlitere centoj, en Riga jam estis profunde tuŝitaj pro via subtenado de la laborado. Mi volas danki al vi por tiuj, kaj por mi, ke vi montras al mi la ĝustan komprenon de graco kaj la esperon por eterna vivo en la Regno. Pro tio, ke iu, pro graco, metis reklamon en ĵurnalon; pro tio, ke Dio pro graco kondukis min rimarki ĝin kaj respondi; pro tio, ke iu organizis seminarion kaj Bibliaj lernejojn; pro tio, ke Dio per sia graco promesis min savi - el mia tuta koro mi tre tre multe dankas al vi kaj al Dio!

Fratino Irma, Riga, Latvio

(1 lato = 2 \$)